
# AMERIKA ESPERANTISTO



## March, 1927


| | Page |
|---|---|
| Parolado pri Esperanto | 1 |
| Radio | 2 |
| News and Notes from the Central Office | 3 |
| Congress of International Rotary Clubs | 7 |
| Laŭdo al Melankolio | 8 |
| A Study of Prepositions | 9 |
| Folklora kaj Etnografia Grupo | 10 |
| Pri Niaj Kursoj | 10 |


KORESPONDANTOJ

Finnlando: Erkki S. Turunen. Litovujo: Pulgis Lemaitis.
Italujo: Allessandro Mazzolini, L. K.
Hungarujo: Puskas Istvan.
Francujo: Salo Grenkamp, L. K.

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.

A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular $1.00; Contributing $3.00; Sustaining $10.00; Life Members $100.

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.

**BERKELEY, CALIF.**

Berkeleja Esperanto Rondo.—Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

**SAN FRANCISCO, CALIF.**

Esperanto Association of California, Inc.—Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

**MONTREAL, CANADA.**

Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

**TORONTO, CANADA**

Por informoj pri la kunvenoj de la Toronta Esperanta Societo, skribu al Sinjoro Harry Wall, 716 Rhodes Ave., Toronto 6.

**DENVER, COLORADO**

Denver Esperanto Society meets Wednesday at 8 P. M., Room 2, 1310 Walton Street. W. A. Buchheim, Sec., 1435 Race St.

**WASHINGTON, D. C.**

Kolumbia Esperanto Asocio, and class, Thursdays, 8.30 P. M.—706 11th St., N. W. Apt. 53.

**ST. PETERSBURG, FLORIDA.**

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

**CHICAGO, ILLS.**

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. —Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.
La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave. —Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

**ROCKFORD, ILLS.**

Scandinavian Esperanto Institute, 221 7th St.

**TOPEKA, KANSAS.**

Topeka, Kansas Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

**BOSTON, MASS.**

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

**WORCESTER, MASS.**

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

**BALTIMORE, MD.**

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

**DETROIT, MICH.**

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M. to 9 P. M. except Tuesday and Friday. Classes meet Tuesday and Friday, 8.10 P. M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

**NEW YORK CITY, N. Y.**

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 63 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

**WEEHAWKEN, N. J.**

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

**CLEVELAND, OHIO**

Cleveland Esperanto Society, Main Public Library. Meets at 7.30 P. M. first and third Wednesdays of each month. S. Kozminski, Sek., 3406 Mayer Ave.

**PHILADELPHIA, PA.**

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y. West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8.15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays.
Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.).
Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

**PITTSBURGH, PA.**

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. —J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

**MILWAUKEE, WISCONSIN**

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

Esperanto Club of Milwaukee, J. R. Williams, Pres., 718 Buffum Street; S. Lilwin, Sect., 671—14th Avenue.

**MADISON, WISCONSIN**

Esperanto Office, 119 W. Main Street.

# Amerika Esperantisto

ORGANO
de la
ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO
507 Pierce Bldg., Copley Square
Boston 17, Mass., U. S. A.
ONE DOLLAR A YEAR

Vol. 37. March, 1927. No. 5.

## PAROLADO PRI ESPERANTO
en Berlino, N. H.

De Prof. Louis C. Lambert (Bostona Universitato)

La lastan someron, dum mia veturado tra la Florido, mi ricevis leteron el la sekretario de la Filoteknika Societo de Berlino, ne de Berlino en Germanujo, sed de Berlino, proksime de Parizo, en Nova Anglujo, en Nova Hampŝiro. Li petis al mi paroli pri Esperanto al la inĝenieroj de la plej grandaj paperfarejoj el la tuta mondo. Mi akceptis plezure kaj, la lastan monaton, je la merkredo 19a de Januaro, mi iris al Berlino.

La vojaĝo de Bostono al Berlino ne estas tre facila. Mi devis ekveturi je la dua matene el la Norda Stacidomo. Mi dormis tre malbone en la dormovagono, ĉar mia najbaro ronkis, ronkadis, ronkegis, preskaŭ la tutan tempon. En Portlando, per aŭtomobilo, mi devis traveturi la urbon, kies stratoj estis kovritaj per dika, blanka tavolo de neĝo. Mi havis la tempon admiri la larĝajn aleojn kaj stratojn de la bela urbo tre bone lumigita. Mi ekveturis el la stacidomo de la Granda Trunko je la sepa por alveni al Berlino je ĉirkaŭ la dekunua.

Tie, S-ro Rasch, la estimata sekretario de la Filoteknika Societo, atendis min. Li estas ĉarma, kaj dank' al li, mi travizitis dum la posttagmezo la ĉefan paperfarejon, unu el la kvin grandaj manufakturoj de la Brown-a Kompanio, ĉiuj kuŝataj inter multe da pentrindaj montoj, tiam kovritaj per senmakula neĝo. Post kelkaj semajnoj, sur la deklivoj de tiuj montoj okazos la vintraj sportoj: glitveturilado, neĝoŝua kurado, toboganado, skiado, k.t.p., ĉar Berlino fariĝas pli kaj pli gravega urbo pro vintraj sportoj.

Mia vizito tra la paperfarejo estis tre interesa. Mi vidis la multajn fazojn necesajn por aliformigi la lignon de la arboj en la diversajn specojn de papero. Mi admiris la grandegan maŝinarojn kaj ankaŭ la lertecon de la gelaborantoj. Sed mia vizito en la laborejo de serĉadoj estis ankoraŭ pli interesa ol la vizito

de la paperfarejo. Tie mi vidis la ĥemiistojn farantaj el la ligna molaĵo celuloidon kaj artefaritan silkon. Aliaj personoj estis ankaŭ aliformigante araĥisoleon (peanut oil) en grason nomatan "Krisko," dank' al hidrogeno, kiu estas flanka produktaĵo. Nenio estas disperdata; ĉiuj flankaj produktaĵoj estas uzataj. Tial multe da vagonaroj estas ŝarĝataj ĉiutage de la produktoj la plej diversaj de tiuj grandaj manufakturoj.

Dum la vespero, la kunveno, celo de mia vojaĝo, okazis en la komforta domo de la Y. M. C. A. (Kristana Asocio de junaj viroj). Mia parolado bone sukcesis precipe dank' al la ekspozicio de multaj bultenoj, libroj, ĵurnaloj kaj dokumentoj afable pruntedonitaj de F-ino Meriam, la ĉarma sekretariino de nia Nord-Amerika Asocio. Mi akcentis la sekvantajn punktojn:

1. Neceso de internacia helpa lingvo;
2. Mortinta lingvo kiel latina, aŭ kia ajn moderna lingvo estas neadekvataj;
3. Nur neŭtrala lingvo estas dezirinda;
4. Esperanto solvas la problemon;
5. Kio estas Esperanto?
6. Historio de Esperanto kaj la nuna movado;
7. Konkludo: lernu Esperanton!

La ĉeestantoj, almenaŭ sepdek-kvin inĝenieroj kaj kelkaj sinjorinoj estis tre interesigitaj. Ili demandis al mi multe da informoj pri nia afero, kaj mi respondis plezure.

Je la 1a de Februaro, 1927, en la Brown-a Bulteno (The Brown Bulletin), paĝo 21, estas la raporto pri mia parolado.

Mi klopodis por semi en Berlino bonan grenon de Esperanto kun la espero ke, en la proksima estonteco, tiuj ĉi semoj donos bonan rikolton.

---

## RADIO

La Cleveland Esperanto Societo ĵus finis aranĝojn por longdistanca radio provo de Cleveland per Radio Stacio WHK (272.6 metroj aŭ 1,100 kilocikloj, komencante je meznokto, Lundon, la 14an de marto, 1927, ĝis 2:00a horo frumatene (Eastern Standard Time, NovJorka tempo). Tre interesplena Esperanto programo de muzikaĵoj kaj mallongaj paroladoj, kun anoncoj kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo, estos intersemita kun tipaj Amerikaj orkestraĵoj.

Ni faras tiun ĉi disaŭdigon ĉefe por doni al stacio WHK la okazon komuniki kun Eŭropo per Esperanto. Se ni sukcesos en nia celo, la Esperanta movado en Usono ricevos la plej grandan antaŭenpuŝon eblan, altirante la atenton de miloj da Usonanoj; tial nia societo koncentrigas siajn penojn en tiu sola entrepreno.

Sekve, ni petas vin partopreni la honoron kiun tiu ĉi alportos al Esperanto, kaj ni sugestias la jenan agmanieron: interrilatu kun la posedanto de la plej forta ricevaparato en via urbo. Se li ne estas samideano, bonvolu klarigi al li la idealojn de nia lingvo, kaj la cirkonstancojn sub kiuj tiu ĉi disaŭdigo estas farata, kiel notita supre. Dum la du horoj, estos mallume en Cleveland kaj trans la oceano kaj la Eŭropeaj radio-stacioj estos silentaj. Kvankam la horo estas iom maloportuna, ni esperas ke vi povos fari kontentigajn aranĝojn por aŭskulti nin. Se eble, venigu kelkajn aliajn kiel atestantojn, se hazarde WHK estos aŭdata de vi. Ni plue konsilas ke vi presigu artikolon pri tiu ĉi provo en la ĵurnaloj de via urbo, por ke aliaj personoj sciu pri ĝi, kaj se eble ke vi sendu la eltranĉaĵon al WHK.

Se vi sukcesos aŭdi la programon, nepre skribu en Esperanto al: Radio Station WHK, Carnegie Hall, Cleveland, O., U. S. A., sciigante la precizan horon, kio estis aŭdata, kaj ankaŭ la subskribojn de la atestantoj. Se vi ne aŭdos nin, bonvolu almenaŭ skribi en Esperanto al WHK, laŭdante ĝin pro la uzo de Esperanto en internacia provo. Ni respondos al ĉiuj komunikaĵoj.

Ni komprenas ke ni multe klopodigas vin, sed en la nomo de Esperanto ni petas vian komplezon.

Stanley Kozminski,
Sekretario, Cleveland'a Esperanto Societo.

---

Just as the Magazine goes to press the cheering news comes from Stanley Kozminski that he has recovered sufficiently from the effects of a serious surgical operation to be at home again and busy preparing for the broadcast of March 14th.

Tune in on the program if possible, and then tell WHK about it. If you cannot listen to the program, write WHK just the same, conveying your good wishes. If there is sufficient interest expressed, regular broadcasts will go out from WHK.

---

## NEWS AND NOTES FROM THE CENTRAL OFFICE

### Idaho

The Boise News of January 10, gave a short history of Esperanto and announced a broadcast over KFAU, "The Voice of Boise," by Robert Blackstone. Enough requests followed for a course of lessons, and there is a five minute lesson every Tuesday at 8 P. M. Listeners are asked to send a card of appreciation to KFAU. Following the radio talk Mr. Blackstone teaches a class of High School students at 8.30 in the Public Library.

## Illinois

From Dr. Ŝimonek of Chicago comes "lakone" the following report from this tireless worker for "la sankta afero."

Lasta kurso estis aranĝita per La G. No. 1.

Komencita je la 3a de okt. 1926 kaj havis 27 gestudantojn.

Finita je la 26a de dec.

Ekzamenoj okazis je la 9a de januaro 1927 kun 16 partoprenantoj.

Sukcese plenumis la ekz. 10.

La graduo okazis sabate la 29an de januaro.

Je la 9a de februaro okazis propaganda kunveno kaj monio ricevis la duan gradon.

El la 10 gradigitaj, ricevis rekompence senpagan anecon por unu jaro; 5 de la Gradata No. 1 kaj 5 de la Gradata No. 2.

Je la 9a de februaro okzis propaganda kunveno kaj

La 16an de februaro estos malfermota nova kurso kun ĉirkaŭ 25 gestudantoj, aranĝita per la Gradata No. 3.

Je la 6a de Marto estos malfermota supera kurso per La Konsilantaro de la Gradata Asocio.

## Massachusetts

The Esperanto class at Boston University numbering over seventy, which has a two hour session each Tuesday morning, was divided into two sections. Professor Lambert also teaches a smaller group Friday evenings; some members are intending to use Esperanto on an European trip the coming summer.

At the Fifth Saturday Barĉo of the Boston Esperanto Society January 29, about twenty-five were present. President Lee, in a speech of welcome, gave a short account of the progress of Esperanto in foreign countries, referring also to the many schools in which Esperanto is now a part of the curriculum. Mr. S. Harrison Lovewell, a guest, favored with two piano selections. The beloved Honorary President of E. A. N. A., Mr. Payson, recounted some of the large gatherings in Boston previous to the great war, and read the Thirteenth Chapter of Corinthians from the Esperanto Bible. Miss Meriam, Secretary of E. A. N. A. spoke of the progress of Esperanto in broadcasting and in educational institutions in Usono during 1926, afterwards showing the guests the exhibit of Esperanto Magazines received on exchange. Mr. Hastings made a special point of the valuable information he had received through his many Esperanto correspondents. Professor Lambert of Boston University gave an account of his recent talk before the Polytechnic Club at Berlin Mills (see page 1) and Miss Butman reported on the group she is teaching at the Old Colony Secretarial School. Dr. Dontcho Kostoff, of Sofia, Bulgaria (now at the Bussey Institute of Harvard University), related his experience in learning Esperanto

(which he speaks well) in ten lessons. The special guest of the evening was S-ro S. Sugimoto, Commissioner from the Island of Formosa, who gave information of the Esperanto movement in Formosa and showed the magazine "La Formoso." He had met Mr. Osaka in New York and they are planning to develop the study and use of Esperanto in Formosa after his return.

In a recent letter from Hans Julow of South Hadley, he says very frankly that though much stress was laid at the Philadelphia Congress on planning Esperanto talks on shipboard, he resolved **not** to do so on his contemplated trip for he felt the need of a complete rest. "But, 'Der Mensch denkt und Gott lenkt" (Man plans and God guides) as the Germans say." A pleasant company of about 125 cabin passengers were on board the North German Lloyd S. S. Munschen. They soon became acquainted, and as Mr. Julow wore the green star, conversation often turned to Esperanto and he was asked to give a talk. Though notices were posted of a meeting in the Writing Room, it proved inadequate and about half the cabin passengers gathered in the saloon. With Privat's "Vivo de Zamenhof" as a basis, he gave a brief account of the life of La Majstro, tracing the growth of the idea along with his own growth. He explained some of the leading features of the structure of Esperanto, making clear its advantages. He spoke in German but as many also knew English it was possible to make comparisons in that language. The audience was so attentive and appreciative, and thought flowed so freely, that an hour passed without it being realized. Questions and answers followed, keys were distributed, and it was evident that the simple but earnest message had struck home. Mr. William Lang, the ship's printer, was an Esperantist of long standing, and by use of the UEA jarlibro, they referred inquirers to European Esperantists whom they might meet in their travels. Mr. Julow not only received many thanks from the passengers but also from the Chief Steward in the name of the management, and he says: "You were quite right indeed. A liner does present unusual opportunities for propaganda work, and I hope that Esperantists will bear this in mind whenever they travel."

### Minnesota

The February meeting of the Twin City Esperanto Club (Minneapolis-St. Paul) was held at the Minnesota Union on Valentine's Day, and in consideration of that event, those present at the dinner found their partners by matching cards having red hearts, and a number of clever Valentines were presented. Following the dinner, a short business session was held at which plans were laid for another Esperanto broadcast from WCCO. An interesting program was presented. Charles H.

Briggs, vice-president and delegate of the Universal Esperanto Association, gave a history of the Esperanto movement with special reference to the altruistic motives which impelled Dr. Zamenhof, as a boy, to dream of bringing about universal peace and brotherhood, also the present utility of Esperanto. This talk was given for the benefit of visitors, and at the end a number of questions were asked and answered.

Henry Libby, treasurer of the club, read an interesting outline of the life of Zamenhof.

Dr. Edwin L. Clarke gave a talk about his large radio class in Esperanto.

Miss Elsa Steinmetz introduced a group of four, five minute Humorajoj, presented by Messrs. Sanderson, Barnes, Boyes, and Miss Frink.

A public rehearsal of the cast of "Ĝis la Revido" was given under Dr. Clarke's direction. This will be presented by radio, February 21st from WCCO at the usual lesson hour.

The evening closed with some Esperanto songs in which many of the older as well as new Esperantists took part.

Professor Clarke's radio course is continuing with unabated interest. Every day orders are coming in for text books, dictionaries and magazines, and it is bound to hold the record for attendance for many a day. Although an attempt will be made to sum up the results of this course when it ends in June, it is unlikely that anything like a full report can be made due to lack of information.

It is a pleasure to announce the formation of the Lincoln Esperanto Group on January 17th at Zumbro Falls, with Mr. Emil Gerben for President and Miss Ruth Sturm as Secretary. The following day a letter of thanks was sent to Professor Clarke for having interested them in Esperanto. On Monday evenings they listen to the broadcast over WCCO, after which Rev. E. Scharlemann, the Honorary President, gives further instruction.

### New York

The February Barĉo of the New York Esperanto Society was held as usual at Hotel Endicott, where it was reported that several are planning to go to the Danzig Congress on the Baltic-American line. One of the speakers gave the news that at a recent meeting of the Parents League of New York the President advocated the study of Esperanto.

Miss Leonora Stoeppler, Secretary of the Society for many years, has sabbatical leave from her school from February first to August thirty-first and will take a much needed rest, spending the summer in Europe.

### Oklahoma

Mr. E. E. Stephens of Seminole (R. 3, Box 1) asks to have the

addresses of all Esperantists or those who may be interested in Esperanto in Oklahoma, as he is desirous of forming a State group in order to push the study of Esperanto.

**Pennsylvania**

Philadelphia. S-ro H. W. Hetzel je la 14a de januaro paroladis ĉe la "Friday Evening Club" de la "Ethical Culture Society." Speciale interesa estis la ekspozicio de libroj, gazetoj, ilustritaj poŝtkartoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Je la 20a de Januaro, S-ro Hetzel paroladis ĉe la festeno de la "American Chemical Society" en Houston Hall, Universitato de Pennsylvania. Ĉeestis 65 personoj, preskaŭ ĉiuj teknikistoj, kiuj bone ricevis la ideon pri komuna lingvo inter la scienculoj de la mondo.

**Wisconsin**

The following Notice appeared in the "Capital Times" of Madison and the "Wisconsin State Journal":

ESPERANTO CLASS AT VOCATIONAL SCHOOL

> A meeting of persons who would like to know about Esperanto will be held in Room 243, of the Vocational School on Monday Jan. 24, at 7.15 P. M. Radio fans, boy scouts, folks considering travel to Europe next summer and teachers who are looking forward to teaching Esperanto are especially invited. If a sufficient number of persons desire it, a class will be formed. A set of phonograph records spoken by Dr. Privat of Geneva, Switzerland, the President of the International Association of Esperantists, will be used in the lessons to insure the students a correct pronunciation of the language. The aim of the proposed course is to give the students a good reading and speaking knowledge of the language by the end of the semester.

Mr. Glenn P. Turner writes that a class has been formed in response to this call and is, as far as is known, the first class in Esperanto to be given in a public school in Wisconsin.

E. J. Meriam, Secretary.

## CONGRESS OF INTERNATIONAL ROTARY CLUBS AT OSTEND

During the week of June 5th there will be held at Ostend, Belgium a congress of International Rotary Clubs. This organization numbers over one hundred thousand members in thirty or more different countries. As the ideals of Rotarians are similar to those of Esperanto, many local Clubs have invited Esperantists to speak before them, and the talks have been enthusiastically received. In view of the coming international meeting there is a call for concerted effort to make Esperanto

one of the subjects brought before the conference. All Rotarian-Esperantists expecting to attend the Congress or having friends who are going, are requested to write at once to S-ro Rollet de l' Isle, 33, Rue du Sommerard, Paris 5, giving their names and addresses, that plans to this end may be perfected. The Central Office of E. A. N. A. can also make valuable use of the same information.

## LAŬDO AL MELANKOLIO

Verkis Juhani Sho

Tradukis Ekki Turunen

Malproksime de ĉi tie sur bordo de soleca arbarlago, sur pinto de terlango, kie staras malgranda dometo, duone kovrita de neĝamasoj—tie mi volus esti.

Mi havus malgrandan dometon, kie mi sole vivadus, kato ŝpinronketus sur la forno, grilo ĉirpus ĉe l' fajrejo kaj malgaja luno brilus super neĝaj kampoj, kaj glacieroj trembriletus ĉe l' fenestro —tie mi volus esti.

Mi neniam invitus al mi, kiu min ĝene rememorigus pri tempoj pasintaj. Kaj mia sola amiko estus la malnova kuprakorda kantelo, kiun mi ludus, sidante sur la apudforna benko en la mola varmo, kaj mi rigardus kiel la lumbildo de l' luno transirus de unu plankbalko sur alian.

Kaj kion mi ludus? Mi agordus la kordojn de mia kupra muzikilo por laŭdi la melankolion de l' soleco kaj mi prikantetus la senvortan funebron de mia animo doloretanta. Mi ne furiozus, mi ne plorus nek ŝiradus la bruston—sed mi lasus la senlarman sopiron mildiĝe kvietiĝi eĉ la postondojn de ventegoj pasintaj.

Kaj kiam mi estus ludinta mian melodion ĝis fino, mi pendigus la muzikilon ĉe la muro kaj rigardadus la malĝoje starantan picearon kaj la pale malvarmajn nubetojn kaj la trembriladon de la neĝo sur tegmentoj. Kaj paco, paco, paco plenigus mian bruston doloretantan kaj mia animo solviĝus en dolorplene silenta ĝojo.

## DEZIRAS KORESPONDI

Specialisto pri fruktĝardenkulturo ĉe Petrovskaja Agrikultura Akademio deziras korespondi kun Usonaj kolegoj. U. S. S. R. Moskva, Timirjazevskaja Akademio dom N 1 kv. 15. S. Krajnov. (Moskow, Union of Socialist Soviet Republics.) La koverto devas havi la adreso en ambaŭ anglo kaj esperanto.

R. E. Jarosch, Breslau, 5, Germanujo. PI.

Fino Mario Pudlova, Red. St. Drah VII/I, Olomouc, Ĉeĥoslovakio. PI. L.

S-ro Martti Mäntynen, Kerava, Finnlando. PI. L. PK.

## A STUDY OF PREPOSITIONS

Hieraŭ matene mi iris AL la onklo. Li estis EN la domo. Mia vizito faris AL li grandan plezuron kaj li min akceptis KUN afablo. Li sidis ANTAŬ la forno, kiu sin trovis ĈE unu angulo DE la ĉambro. Mi iris APUD lin. Post saluto mi sidiĝis APUD la forno kaj rigardis ĉirkaŭen.

SUR la muroj pendas multe DA pentraĵoj en kadroj kaj SUB la tablo kaŭris hundo, kiu LAŬ la voko de sia mastro tuj stariĝis kaj alkuris al ni EL SUB la tablo kaj sin ĵetis SUR la genuojn de l' onklo kaj sin kaŝis POST (=MALANTAŬ) la fornon kaj baldaŭ returne kuris SUB la tablon.

TRA la fenestro mi povis ĝui la pitoreskan pejzaĝon de l' malproksimaj kampoj kaj montoj, kies suproj estis tute kovritaj DE neĝo. EKSTER la domo muĝis vintra ventego.

Subite unu muŝeto eniris EN la ĉambron kaj flugis SUPER niaj kapoj kaj rondflugis ĈIRKAŬ la forno kaj POST minutoj ĝi flugis PRETER mia nazo kaj tuj TRANS la fornon forflugis EL la ĉambro, kaj ĝi malaperis MALANTAŬ (=POST) la pavilono, kiu staris KONTRAŬ la domo. INTER la pavilono kaj la domo estas ĝardeno, kie nun staras nur arbetoj SEN folioj sed kie en ĉiu printempo rozoj, lilioj kaj aliaj floradas kaj DE mateno ĜIS vespero multe DA papilioj kaj insektoj vizitas la florojn. TRANS la ĝardeno fluetas rivereto, kie fiŝetoj saltadas SUPER la supraĵon de l'akvo. LAŬ onidiro tie ofte naĝadas testudoj KROM fiŝoj, sed MALGRAŬ la famo mi ankoraŭ neniam trovis testudojn tie. DUM miaj infanaj tagoj mi ofte iris tien KUN amikoj por kapti fiŝojn kaj fiŝadis POR du aŭ tri horoj kaj ni dividis INTER ni la kaptitajn fiŝojn. Ofte ni ĉiuj ricevis PO 10 fiŝoj. KONTRAŬ mia intenco miaj gepatroj ne permesis al mi manĝi ilin. Rememoroj pri miaj infanaj tagoj revenas senfine unu post alia.

La kuzineto envenis sola, alportante al mi glason da teo, ANSTATAŬ sia patrino. Ŝi ĵetis pilkon ANTAŬ la hundeton kaj la lasto bojetis ĈE tiu malgranda petolo. DE surprizo ŝi plorkriegis. La onklo forpelis la hundon EKSTER la ĉambron kaj ŝin karesis kaj donis al ŝi pupon EL celuloido, kiun ŝi forĵetis for DE si.

DUM la tuta tago ni interbabiladis PRI diversaj temoj. ANTAŬ la vesperiĝo ĈIRKAŬ la kvina horo mi tuj forlasis la domon dirante adiaŭon al ili ĉiuj, ĉar mi rememoris ke mi promesis ĉeesti la kutiman kunsidon de esperantistoj EN tiu ĉi vespero, kiun ni okazigas POR ekzercado de interparolado Esperanta. PRO tiu ekzercado ni fariĝis lertaj en Esperanta parolado SUPER nia antaŭa supozo.

Sur la vojo mi renkontis Sinjoron A, kiu estas la plej lerta esperantisto EL ni ĉiuj, kaj SUB kies gvido ni ricevas lecionojn

de Esperanto unu fojon ĉiusemajne. Kaj ni kune iris al Kafejo "Verda Stelo,"—kiun ni luas POR malgranda sumo de lupago—kie jam kolektiĝis ĉiuj grupanoj KROM Sinjoro B, kaj TRA la kafejo pleniĝis gaja atmosfero.

JE la sesa horo ni malfermis la kunsidon PER la horo de "La Espero." POST tio ĉiuj faris paroladetojn EN Esperanto kaj ankaŭ interbabiladis. EKSTER tio ni havis multajn amuzaĵojn kaj ludojn, kiuj estis tre interesaj POR ni, kaj tiamaniere ni pasigis tre gaje la vesperon, ĉar ni tre bone harmoniiĝas reciproke SUR la komuna ideo de Esperanto.

ĈIRKAŬ la noktomezo ni ĉiuj disiĝis KUN koroj plenaj JE ĝojaj memoroj.

From "La Revuo Orienta, Jan. 1927.

## FOLKLORA KAJ ETNOGRAFIA GRUPO

La 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Edinburgo montris ke Esperanto havigas neordinaran oportunon por komparaj folkloraj studoj. Sekve de tio, okazis fakkunsido de Folkloro kaj Etnografio, en kiu oni decidis starigi internacian grupon por la kontentigo de tiu intereso. S-roj J. van Hengel kaj D. Witterdyk, el Nederlando, afable proponis malfermi apartan rubrikon de Folkloro en ilia revuo "Kolektanto," kaj S-ro R. Kodera, el Japanujo, akceptis la funkcion de fakredaktanto.

Kiel unuan temon kunlaborotan, oni elektis la komparan studon de la popolaj jaraj festoj en diversaj landoj. Tiu laboro estas publikigota serie en "Kolektanto," kaj verŝajne konsistigos interesan kolekton. (La unua artikolo aperis en la Januara numero.)

Estis ankaŭ proponita, ke la grupo estu uzota kiel helpilo por individuaj studoj de ĝiaj anoj dezirantaj ricevi porkomparajn sciigojn de aliaj landoj.

Ĉiu interesato bonvolu interrilatiĝi kun S-ro Kodera, ĉe Mme Gavarry, 187, rue St. Jacques, Paris, 5e (ĝis Majo).

## PRI NIAJ KURSOJ

De S. Alberich Jofre, Direktoro Kataluna Esperantisto

Denove la Esperantistoj komencis en siaj grupoj kursojn de la lingvo internacia. Post la dumsomera ripozo komenciĝis la aŭtuna plugado kaj jen ni atendas la printempan rikolton. Ĉu ni rikoltos multnombrajn kaj bonkvalitan frukton aŭ ni vidos kiel kutime ke la nombro de komencintoj iom post iom malgrandiĝas kaj ke fine restas kelkaj fervoraj lernantoj, kiuj alvenos al la fino de la kurso kun supraĵa kono de lingvo?

Ni konstante spertas, ke la unuagradaj kursoj liveras samideanojn, kiuj povas legi kaj skribi Esperanton pli malpli bone, sed al ili multo mankas por havi plenan konon pri la mekanismo de la lingvo. Ĉeesto en supera kurso estas nepre necesa por kompletigi la embrian konon. Tamen, grandaj malfacilaĵoj prezentiĝas por efektivigi tion. Unue la grupo ne trovas facile spertulon, kiu povus preni sur sin la taskon de vere supera kurso kaj ne ĉiu lingve sperta Esperantisto taŭgas por tiu ofico. Krom tio, la malsano de neperfekteco estas malnova kaj Esperantistoj el la unuaj rikoltoj ne estas sufiĉe poluritaj por doni la necesan helpon al la novaj. Ili neniam metis al si en la kapon, ke ili devas ellerni la lingvon.

Nia kara kunbatalinto Hodler iam diris en tre interesa artikolo, parolante pri la novaj lernantoj, "kiam oni povas iom paroli pri elementaj aferoj, oni rezignas je plua studado." Prave, vi facile povas konstati kiel sensignifa nombro ĉeestas superan kurson. Kio do fariĝas el la unuagradaj lernintoj? Tute simple; aŭ ili supozas ke la atingita scio sufiĉas por interŝanĝi sensencajn poŝtkartojn, aŭ ili pensas, ke ilia kapo ne taŭgas por plua studado. Ili ankaŭ povas esti instigataj al la forlaso de la komencitaj studoj, kiam ili trovas, ke Esperanto ne donas hodiaŭ sufiĉe praktikan profiton.

Ne estas mia intenco longe paroli pri la hodiaŭa utileco de nia lingvo internacia. Ni celas precipe iom helpi al la enradikigo profunda kaj vera de la lingvo. Pri la utileco, flanka aspekto de idealistoj, ni povus trovi argumentojn kaj pravigojn sed tio ne estas nia celo.

Esperanto, krom la flanko amuza, el kiu oni povas eltiri laŭvolan porcion—kion cetere oni faras tre malavare—havas pli altan kaj noblan celon en la mondo, ol interŝanĝado de poŝtmarkoj, poŝtkartoj senenhavaj k.t.p. Por tio sufiĉas supraĵa lernado, por tio estas sufiĉa kelksemajna studado. Tiaj Esperantistoj restos en niaj vicoj ne pli longe ol ĝis ilia kolektemo aŭ scivolemo estos kontentigita. Certe ni povus fari iun escepton kaj konstati ke post la vekita scivolemo venas sindonemo al la internacilingva afero.

Ĝenerale neniu estas malkapabla por ellerni Esperanton. Volo estas sufiĉa por tio kaj ne granda intelekto. Pli ol unu fojon mi konstatis en miaj kursoj, ke pli multe progresas en la lernado ne tiu, kiu havas lingvistikajn konojn kaj ĝeneralan intelektan kulturon, sed tiu, kiu sin donas plene al la studado, kies entuziasmo kaj lernemo kompensas la mankon de instruo.

Sekve, kion oni devas fari por konservi la maksimuman nombron da lernantoj kaj eltiri plej altan pozitivan profiton el niaj kursoj?

Antaŭ ĉio oni devas elekti—se oni povas elekti, kompreneble—taŭgajn gvidantojn de la kurso. Ni jam diris pli supre, ke ne

ĉiu Esperantisto taŭgas por instrui Esperanton. Ne sufiĉas, ke la instruanto parolas kaj skribas korekte la lingvon—en nia nacia lingvo mem ne ĉiu kiu uzas la lingvon bone, povas preni sur sin la gvidon de kurso—estas necesaj kelkaj apartaj kvalitoj por doni vivon al la kurso, konservi la lernantojn en konstanta intereso kaj reteni ilin apud si ĝis la fino de la kulturata verko.

La kursgvidanto sondu la psikologion de ĉiu nova adepto, li esploru kaj eltrovu la inklinojn de la varbito por trovi la ĝustan malfermaĵon tra kiu li inokulos la semon de intereso, sindonemo kaj asimilo. Se li sukcesos sur tiu ĉi vojo, se li tiamaniere povis altiri la valorajn elementojn novajn, tiam facile malfermiĝos rekta vojo por sentigi la spiriton de la lingvo.

Kiel ĉiuj naturaj lingvoj, Esperanto, ne malpli natura ol ili, kiel pruvis diversfoje nia kara profesoro Dalmau, havas sian propran personecon, sian spiriton. Se la uzanto ne konatiĝas kun tiu spirito, tiam la lingvo fariĝas peza kaj nefleksebla, sed se oni venkas ĝin, oni renkontiĝas kun elasteco, fleksebleco, kiuj mirigas la lernanton pli kaj pli.

Ni multobligu niajn klopodojn por doni al la kursoj la maksimumon da favoraj ŝancoj por reteni la konvertitojn kaj tiel ni evitos tian amasiĝon de lingvaj mallertuloj, kiuj ne sentas inklinon legi niajn gazetojn, niajn literaturajn verkojn, k.t.p. Tia rezultato ne estas naskita de la lingvo mem, ĝi ne devenas de individua mallerteco: ni mem estas kulpaj, ke ni ne sufiĉe kulturas la ellernigadon. Ni propagandas kaj uzas niajn fortojn por la elementaj kursoj kaj al la superaj ni donas flankan gravecon kaj vivon tre mallongan.

Tro ofte ni propagandas, ke Esperanton oni povas lerni en daŭro de kelkaj horoj, ne atendante pri tio, ke ĝi postulas kelkajn monatojn de profunda studado, konstanta ekzerciĝado kaj praktikado. La lernantoj estas tiel konvinkitaj, ke kelkaj lecionoj sufiĉos por koni la novan lingvon, ke ili forlasas la studon post kelka tempo konstatinte ke la afero ne marŝas kiel ili antaŭsupozis.

Ni diskonigu la facilecon de Esperanto, sed ni ne diru tion tiel ke oni povus kredi pri absoluta facileco. La facileco de la Zamenhofa verko rezultas el la malfacileco de la naciaj lingvoj kaj nur kompare al ili ĝi prezentas tiun altan gradon de supereco kaj facileco. Ni diru al la novaj lernantoj, ke la tasko, kiun ili entreprenas, postulas sinoferemon, konstantecon kaj intelektan streĉon. Se ni agos tiel ni evitos, ke multaj homoj eklernas la lingvon kaj poste fariĝas ĝiaj malamikoj.

Nun, ĉe la komenco de la lastaj kursoj, ni pripensu kiel grava estas nia instrua tasko por la bono de nia afero. Ni klopodu por ke la novaj varbitoj ĝisoste konvertiĝu.

—Kataluna Esperantisto, Jan. 1927.

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT — A CLASS THEN AND THERE
BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE
Drop us a postcard for a catalog
THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

A FEW OUTSTANDING BOOKS ON SALE AT THE CENTRAL OFFICE
Esperanto Translations by
Edward S. Payson, Hon. President E. A. N. A.

| | |
|---|---|
| MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito<br>Dr. J. U. Gisey | $ .35 |
| LA ROZUJO ĈIUMILJARA<br>Mabel Wagnalls<br>THAIS<br>Anatole France | $ .50 |
| LA PALACO DE DANĜERO; Rakonto pri Madame la Pampadour, luxe bindita 220 pages<br>Mabel Wagnalls | $1.50 |
| LA AKROBATO DE NIA SINJORINO<br>(Aŭtoro Nekonata) | $ .35 |
| BLANCHE, La Virgulino de Lille<br>Ossip Schubin | $ .35 |

THE COMPLETE BIBLE IN ESPERANTO

1. Art Vellum, Ordinary paper $1.75
2. Art Vellum, India paper, gilt top 2.50
3. Persian Morocco, India paper, gilt top 3.50
4. Yapp, leather lining, India paper, gilt top 5.50

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.
507 Pierce Building, Copley Square
BOSTON, MASS.

Save Money on Your
PERIODICAL SUBSCRIPTIONS
Lowest Club Rates on Your List.
We make a Specialty of furnishing Magazines of all kinds wherever published, to subscribers anywhere.
Send us your Magazine orders for Quotation
THE PALMER CO.
120 Boylston St. Boston, Mass.

## REPUDIATION

Just before we closed our forms for the January issue, we received copy for an advertisement from the Acme Farms, Gainesville, Florida, and having every appearance of good faith we inserted it, but as information since received raises a serious doubt as to the good faith of the business therein advertised, we take this means of so notifying our readers.

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO
Reklamoj $20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo $150. Perantoj skribu, pri rabato.

# STUDY ESPERANTO

ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language

**Recognized and in use as such since the World War by:**

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle, Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg, Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

**UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY**
By vote of September 21, 1922

# HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

## CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA
**and courses by correspondence may be arranged for anywhere**

(If you lack details as to local courses write today to)
**The Central Office of the Esperanto Association of North America**
**507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies**